

Kio novas en lingvistiko?

prelego de s-ro Jouko Lindsted el Helsinko, Finnlando

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-830/303, 1979 septembro 06 kaj 08

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-45/SRI-1979-45-B-6-303-830-1979-09-06-09-08-Claude-Gacond-Kio-novas-en-lingvistiko-prelego-de-s-ro-Jouko-Lindsted-el-Helsinko-Finnlando.mp3>

CL.- Salutas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ, por la dua fojo, ni havas la honoron aŭdigi al vi prelegeton de s-ro Jouko Lindsted, lingvisto en Helsinko, Finnlando. S-ro Jouko Lindsted prelegis dum unu semajno en la kadro de Internacia Feria Altlernejo (IFA) en La Chaux-de-Fonds pri la temo 'Enkonduko al ĝenerala lingvistiko'. Kiel eĥo de tiu ĉi kurso, hodiaŭ s-ro Jouko Lindsted parolos al vi pri la temo 'Kio novas en lingvistiko?'.

JL.- Por homoj neprofesie interesiĝantaj pri lingvistiko, la koncepto pri la plej moderna lingvistiko ligiĝas al la tiel nomata transforma-genera gramatiko kaj al ĝia fondinto, usonano Noam Chomsky. Oni kutimiĝis al certaj matematikecaj manieroj priskribi la strukturon de la frazoj kaj vortoj, kiel ankaŭ al la nocioj "profunda strukturo" kaj "surfaca strukturo".

La surfaca strukturo estas la strukturo de la frazo tia, kian ni ĝin diras kaj aŭdas, aŭ skribas kaj legas. La profunda strukturo, male, reprezentas ion esencan por la signifo de la frazo. Oni diras, ke la frazoj "Johano amas Marian" kaj "Maria estas amata de Johano" diferencas nur surface, sed respondas al unusola profunda strukturo, ĉar ili estas samsignif. Aliflanke, la frazo "Mi ne dormis dum la tuta nokto" respondas al du diversaj profundaj strukturoj, ĉar ĝi estas dusenca: aŭ mi celas diri, ke dum la tuta nokto mi maldormis, aŭ mi celas, ke ne dum la tuta nokto mi dormis, tamen jes dum la parto de la nokto. Oni asertas, ke la profundaj strukturoj estas pli-malpli similaj en ciuj lingvoj, dum la transformoj, tio estas l.a reguloj ŝanĝantaj la profundajn strukturojn en la surfacajn, tiuj transformoj povas esti tre malsimilaj en diversaj lingvoj.

La fino de la sesdekaj jaroj signifis la floradon de la transforma-genera gramatiko, precipe en Usono. Sed dum la sepdekaj jaroj ekestis duboj, kaj nun, fine de la jardeko, ni povas klare vidi, ke por la transforma-genera skolo venis vico aspekti nemoderna.

Jam la distingo inter la profunda kaj surfaca strukturoj implicas certajn problemojn. Por kontesti la ĵusan ekzemplon pri Johano kaj Maria, ni povas demandi, kial tamen ne estas samsignifaj la frazoj 'Ĉiu amas iun' kaj 'Iu estas amata de ĉiu'. Sed la ĉefa problemo troviĝas iom aliloke. La plej grava eraro de Chomsky evidente estis kunigi psikologion kaj formalismon. Per "formalismo" ni komprenas la priskribon de la lingvoj per formalaj rimedoj - per mallongigoj, signoj, formuloj kaj reguloj similaj al tiuj en matematiko, kemio, fiziko, formala logiko kaj tiel plu. Ekzemple la transformon oni difinas ĝuste per tiaj signoj kaj simboloj. Sed tio, kio efektive okazas en la cerbo de homo, kiu parolas aŭ pensas en iu lingvo, estas evidente afero esprimebla psikologie. Tiuj psikologiaj faktoj povas kompreneble post la esploro esti prezentataj per formalismaj rimedoj. Sed la rezulto estas ofte tute malsama ol kiam ni studas nur la lingvon mem, sen konsidero al tio kio okazas en la homa kapo.

La generistoj skribis siajn transformajn regulojn surbaze de la studado nur de la fakto de la lingvo mem, tamen, ili samtempe pretendis, ke tiuj transformoj estas io kiu vere okazas en la cerbo. Tia deviga geedzeco de du malsamaj aferoj ne povis sukcesi. Sekvis eksgeedziĝo: nun unuj lingvistoj studas tion, kiel plej bele studi lingvojn per pure formalaj rimedoj, dum aliaj

interesiĝas pri tio, kiel ordinaraj homoj konceptas sian propran lingvon. Eble oni baldaŭ denove sintezos la du aferojn, sur pli alta nivelo. Tio ja estus normala procezo en la disvolviĝado de iu ajn branĉo de scienco.

La nuntempajn formalistojn interesas ĉefe semantiko, tio estas, la studado de la signifoj. La plej novajn verkojn pri semantiko oni bedaŭrinde ne povas kompreni, se oni ne scias ion pri la formala logiko kaj ankaŭ pri matematiko, ĉefe pri la teorioj pri aroj kaj funkcioj. Oni parolas pri "logikolingvistiko". Laŭ ĝi, la signifo de iu frazo estas tiu ĝia eco, ke ni scias, en kiaj cirkonstancoj ĝi estus vera. Per tio mi ne volas diri, ke la frazo "Ekzistas pli ol miliono da esperantistoj en la mondo" estas sensignifa, ĉar ni ne scias ĝian verecon. Tiu frazo ja havas signifon, pro tio, ke ni tre facile povas imagi tian mondon, kie la frazo certe estus vera, kaj tian, kie ĝi certe estus malvera. Poste, la signifo de ĉiu unuopa vorto egalas al ties kontribuo al la vereco aŭ malverece de la tuta frazo; tio estas, por diri kun iom aliaj vortoj, la vortsignifo estas la uzo-reguloj, laŭ kiuj ni scias, kion la vorto povas simboli en diversaj cirkonstancoj.

Por nun turni nin al pli psikologiecaj aliroj, ni rimarkas, ke tie montriĝis fruktodona precipe la tiel nomata geŝtaltaj psikologio. La principoj estas jam malnovaj, sed iliaj aplikoj al lingvistiko multe pli novaj. Oni rimarkis ekzemple ke la perceptado de similecoj estas esenca kunulo de la homa sensado. Ni pensu pri diversaj manskriboj: ofte nova manskribo estas tuj legebla por ni, kvankam ĝuste tian ni neniam antaŭe vidis, ĉar sufiĉas ke estas ia simileco inter ĝi kaj iuj jam konataj. Oni komparu iun iom ondecan manieron manskribi la minusklon m kun la preslitera majuskla M. Unuavie ili ja ŝajnas sufiĉe malsimilaj, sed se ni metas inter ilin la presliteran minusklon, kiu similas unuflanke al la preslitera majusklo, aliflanke al la manskribita minusklo, ni trovas ĉeneron kiu ebligas konstrui ĉenon de similecoj. Tiaj ĉenoj tre gravas ankaŭ en la lingvo. En la germana lingvo, certaj substantivoj formas sian pluralon ŝanĝante la radikvokalon laŭ la tiel nomata metafonio aŭ Umlaut, dum aliaj alprenas apartan pluralan finaĵon; sed la ĉenon ja bele kompletigas la interĉenero, tio estas la vortoj, kiuj kaj ŝanĝas la vokalon kaj alprenas finaĵon.

Unu el la modernaj konceptoj pri la lingvo estas do, ke la homa lingvo estas grandega kaj komplika reto de intersimilecoj. La vortoj kaj aliaj unuoj situas en la nodoj de tiuj retoj, laŭ kies fadenoj rapidas kurentoj kaj saltadas sparkoj, kiam la homo pensas aŭ parolas.

A.- Vi aŭdis prelegon de la lingvisto Jouko Lindsted el Helsinko pri la temo 'Kio novas en lingvistiko?'. Salutas nome de Svisa Radio Internacia sinjoro Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!